

Honore al Kabe, 5-a parto : Intervjuo de Jean Forge
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 459, 1972.07.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni dediĉas nian atenton al la talenta tradukisto Kabe, kies centjaran jubileon nun festas la esperantistoj.

A.- Kazimierz Bein lernis nian lingvon en 1903. Sub la pseŭdonomo Kabe, jam en 1904 aperis lia unua traduko el la pola : *Fundo de l' Mizero* de Sieroszewski. Tuj la esperantistoj malkovris en Kabe la ĝis tiam plej kapablan verkiston. En 1906 li estis elektita vicprezidanto de la Esperanto-Akademio. En 1907 li ricevis la honoran titolon « *unua stilisto esperantista* » en recenzoj pri sia traduko de *La Faraono* de Prus. Jam en 1911 li komplete malaperis el la esperanto-vivo. Tiun rompon la esperantistoj sentis kiel dizertadon kaj kiam oni parolis pri esperantisto, kiu subite forlasis la esperanto-movadon, oni ekkutimis diri, ke li kabeis.

Cl.- Kálmán Kalocsay opinias, ke « *la plej probabla kaŭzo de la malapero de Kabe estis, ke [tiam] li komencis okupiĝi kun sia kutima febra aktiveco pri sia profesio. Kabe fondis la Varsovian Instituton de Okulmalsanoj kaj daŭre ĝin prezidis. Pli kaj pli malebliĝis, ke li oferu tiom da tempo por esperanto, kiel ĝis tiam [tio estas po 3 – 4 horoj tage]. Kaj laŭ la devizo : « ĉiom aŭ neniom », Kabe rezignis pri Esperanto. Li eble ankaŭ satlaciĝis pro la tro intensa laborado. Ankaŭ lia foto-amatoreco estis tro tentanta rivalo [al Esperanto].* »

A.- Ni opinias, ke en tiu teksto, kiun aperigis la revuo *Esperanto* de UEA en la monato junio, Kálmán Kalocsay iom mildigas la eventojn. Kion ne diras Kalocsay, tio estas, ke Kabe definitive rompis ĉiajn rilatojn kun la esperantistoj, ke li fariĝis kontraŭlo de esperanto. Tion Kabe diris okaze de intervjuo en 1931 :

Cl.- « *Mi ne estas plu Esperantisto, tion vi nepre akcentu en via intervjuo, eĉ mi havas ideojn tute malfavorajn al Esperanto.* »

A.- En 1927 okazis en Varsovio post-kongreso al la 19-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Danzig. Jen kion ni legas tiurilate en tiu intervjuo de 1931, kiu aperis en *Literatura Mondo* :

Cl.- « *En la jaro 1927 Kabe ekturnas la butonon de sia radio-aparato ! Liajn orelojn atingas la voĉoj de la Esperantistoj kunvenintaj dum la Varsovia Postkongreso en la Urba Salono, dissenditaj de la Varsovia stacio ! « Kvazaŭ mi estus denove en Esperantujo... » li rakontas. « La esperantistoj restis la samaj, kvazaŭ mi forlasus hieraŭ Esperanton, nenio ŝanĝiĝis, ili parolas, paroladas, paroladas ĉiam la samon, ĉiam la samon... Kompreneble estis ja kelkaj, kiuj parolis kun senco kaj sciis paroladi.* »

A.- La intervjuinto, kiu verŝajne estas Jean Forge, daŭrigas :

Cl.- « *Kabe mantuŝas sian buŝon kaj mentonon kvazaŭ enpense kaj diras : « La Esperantistoj, jes, ili havas multajn mankojn. Antaŭ ĉio ili ne scias sian lingvon ! Ili tiel malbone parolis ! (ekzemple sur ŝipo sur Ĝeneva lago), ke mi petis paroli al mi en nacia lingvo kaj mi respondos Esperante. Mi memoras dum iu universala kongreso diversajn paroladetojn. Ĉiu pledis por sia profesio : do pastro, ke Esperanto estas nepre necesa por pastroj, oficiro por oficiroj, komercisto ke komercistoj lernu Esperanton ktp. kaj poste mi parolis : Mi opinias ke*

Esperanton plej necese devas lerni la Esperantistoj mem !... kion kvitancis la kongreso per granda aplaŭdo. »

A.- En tiu intervjuo Kabe rakontis pri la strangeo de la tipoj, kiujn oni renkontis en la unuaj Universalaj Kongresoj kaj kiuj amase svarmis en la esperanto-movado, kaj li konkludis tiujn kritikojn per tiu frazo :

Cl.- « *Sed kial mi rakontu al vi tiajn malkuraĝigajn aferojn? Mi ja estas ne plu Esperantisto, eĉ kontraŭlo via!* »

A.- Kabe pensis ke :

Cl.- « *Iam venos nova geniulo, kiu kreos la veran solvon de la lingvo-problemo, Esperanto ja ne estas tiu ĉi solvo. Eble ĝi – tiu mistera plej logika kaj internacia lingvo – venos baldaŭ, eble post 100 jaroj, ĉu mi scias ?* »

A.- Tiu lasta frazo klarigas, kial Kabe neniam interesiĝis pri la planlingvaj projektoj konkurencaj al esperanto. Nek post 1908 li aliĝis al Ido, nek post 1922 al Occidental. Tiuj projektoj, kiuj imitis la latinidajn lingvojn, ne povis kontentigi lin. Li atendis vere logikan lingvon.

Cl.- Dum la sep jaroj de sia esperantisteco Kabe publikigis preskaŭ 2000 dense presitajn paĝojn. Li plenumis vere sciancan laboron en la fako tradukado, kaj liaj verkoj havis decidigan influon sur la posta disvolviĝo de nia literaturo. Kabe en sia fako plenumis rolon iom similan al tiu de René de Saussure koncerne al la vortfarado. Kaj ambaŭ homoj post kelkaj jaroj forlasis la esperanto-movadon, al kiu ili dediĉis tiom da tempo, tiom da fortoj.

A.- Kiam ni legas iliajn verkojn kaj ekzamenas la tiaman sintenon de la esperantistoj, ni alvenas al la opinio, ke ekzistis abismo inter homoj kiel Kabe kaj René de Saussure kaj la ceteraj esperantistoj.

Cl.- Kabe kaj René de Saussure laboris kiel scienculoj. Ili pritraktis esperanton kiel studobjekton. Ili celadis al perfekta kono de tiu lingvo kaj de ties latentaj eblecoj. Ili fariĝis veraj kleruloj, kiujn la nekleraj esperantistoj ne povis plu sekvi. Estis vera dramo, kiu ankoraŭ minacas nian movadon kaj ĝin minacos tiom longe, kiam ne ekzistos Esperanto-Universitato, kiu permesos al similaj fakuloj sin renkonti kaj debati. Kabe kaj René de Saussure, anstataŭ identiĝi kun la esperanto-popolo, kiel faris Edmond Privat, Hector Hodler, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Eugeno Lanti, pli kaj pli sentis sin apartigitaj de tiuj homoj, kiuj ne perfekte parolis la zamenhofan lingvon kaj eĉ ne stude legis iliajn verkojn. Jen verŝajne la kaŭzo de ilia rompo kun esperanto.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !